

Valentin Melnikov

## *Drameto atentinde pensoveka*



*Aŭtodafeo* – triakta tragedikomedio, de João José Santos, eld. La Karavelo, Lisboa, 2011, 45 p., ISBN 9789899631267.

La tragikomedio *Aŭtodafeo* de J. J. Santos estis honore menciita en Belartaj Konkursoj de UEA 2011. Sincere dirante, mi ne ŝatis lian pli fruan drameton *La Ĝenerala Asembleo*, kaj mi ĝenerale skeptikas pri verkoj, kiuj temas pri la vivo interne de Esperanto-mondo. Tamen – la teatraĵo libere elŝuteblas en pdf (serĉu en la retejo [lakaravelo.net](http://lakaravelo.net))<sup>1</sup>, do kial ne legi, almenaŭ pro scivolemo? Ja se ĝi estis distingita, do ne sen kaŭzo...

Kaj la verko evidentiĝis vere inda kaj pensoveka.

Mem la teatraĵo estas unuflanke tradicia – eĉ kun “parolantaj” nomoj de roluloj, kiel antaŭ 200 jaroj. Aliflanke ĝi estas tre moderna: por surscenigo bezonatas 4 komputiloj kun projekciiloj. Do ĉiaokaze ĝi estas unika. Cindy McKee en la prefaco skribas: “Ĝi estas impona mikso de antikvaj ritoj kun nova teĥnologio kaj mi sopiras por vidi lerte plenumitan aŭtodafean scenon”.

Formale la drameto montras homajn rilatojn interne de religia diskutgrupo. Sed same kiel klasikaj fabloj priskribas konduton de parolantaj bestoj, alegorie subkomprenante homojn – kaj nepre sen personaj konkretajoj – tiel ankaŭ *Aŭtodafeo* estas multe pli vasta ol ŝajnas dekomence. Legu/spektu, pensu – kaj por vi pli klaros kial la Esperanto-mondo ĝenerale stagnas, pri kio oni lastatempe ofte plendas en multaj lokoj. Zamenhof kredis, ke malpaco inter homoj kaj popoloj aperas pro nekompreno, sekve de diverslingveco kaj diversreligiĝeco. Nu jen, ni havas komunan lingvon. Kaj la roluloj en *Aŭtodafeo* estas eĉ samnacionoj kaj samreligianoj. Devus regi paco kaj harmonio? “Sed estas ne!”, kiel kantis iu populara...

Vi certe rekonos en la roluloj viajn konatojn. Jen relative juna Pekulo, ankoraŭ ne perdinta entuziasmon. Bigote pia Fidulino, evidente maljuna virgulino, tute perdinta (ĉu iam havinta?) penskapablon. “Veterano de Esperanto-movado” Krokodilo, kiu dum 30 jaroj ne sukcesis atingi eĉ elementan lingvoposedon. Kaj la plej malica kaj abomena esence, kvankam laŭaspekte respektinda gravulo – Ĉefo. Ve, ĝuste tiaspecaj homoj tre ofte gvidas klubojn kaj landajn asociojn: fari

<sup>1</sup> Aŭ ĉe [esperanto.net/literaturo/bk/verk/autodafe.pdf](http://esperanto.net/literaturo/bk/verk/autodafe.pdf) – Red.

ion reale utilan por Esperanto ili ne scipovas kaj ne volas, ilin interesas nur potenco, eĉ se iluzia. Kaj por sekurigi sian potencon ili pretas neniiĝi ĉiun, kiu kapablas pensi libere kaj vere agadas por Esperanto.

Ĉi tie, malkiel en romantikaj fabeloj, finale ne triumfas bono...

Oni povas facile surscenigi la teatraĵon dum iu kongreso. La menciitaj 4 komputiloj kun projekciiloj nuntempe ja troveblas en bonaj kongresejoj, kaj la aktoroj eĉ ne bezonas parkerigi siajn rolojn – sperta programisto povas bone aranĝi ĉion necesan por la prezentado. En la teksto estas uzataj, krom Esperanto, ankaŭ frazoj en la latina kaj la portugala (la aŭtoro permesas anstataŭigi tiujn per loka nacia lingvo). Komputiloj senprobleme vidigos sinkronan tradukon.

Do, la distingo en Belartaj Konkursoj estis donita ne vane. Ankaŭ mi ŝatus iam spekti tiun dramon...

*Sten Johansson*

## *Senproporcio*

La verketo *Aŭtodafeo* havas karakteron de klubvespera skeĉo tute mallonga kun satira intenco. Ĝia mesaĝo estas, ke esperantistoj parolu Esperanton, ne krokodilu kaj ne okupiĝu pri kvazaŭreligiaj ritoj. La enhavo do estas banala naivaĵo. Ĝia formo estas tute diletanta rilate dramaturgion. Mankas agado, mankas vera dialogo, mankas kapablo kapti la atenton de spektantoj. Sursceneje kvar rolantoj tajpas sur kvar komputiloj – jen ĉio. Ĉi tiun tedaĵon la aŭtoro prezentas per megalomaniaj pretendoj, indikoj pri teknikaj rimedoj praktike nerealigeblaj kaj absoluta manko de kompreno pri kio estas teatraĵo. Li ŝajnas havi nenian kontakton kun la reala mondo.

Kial oni trovas en la esperantista mondo tian mankon de sento pri proporcioj? Ĉio esperanta estas mirinde bonega; ĉio ekstera terure malbonega. Jen trajto tipa de sektoj.

Laŭ mi, la ekzisto de amatoraj verkantoj de beletro en la artefarita lingvo Esperanto estas fenomeno kuraĝiga. Se la arta nivelo ne ĉiam estas alta, tio neniel surprizas. Temas pri lingvo juna, lingvo minoritata eĉ en preskaŭ ĉiu uzanto, lingvo lernata, lingvo ofte nur balbutata. Sed kiam homoj proponas kelkajn el tiuj amatoroj por Nobel-premio, mi demandas min, kien malaperis ilia sento pri proporcioj. Multaj esperantistoj ja aperas preskaŭ normalaj en sia eksteresperanta vivo. Sed kiam temas pri *nia kara afero*, ili ekŝvebas foren de realoj.

Tamen, kion fari? Se la esperantistoj estus pli realismaj, ili eble neniam iĝus esperantistoj. Kaj se la aŭtoro de *Aŭtodafeo* konscius pri sia verka nivelo, li restus ĉe Facebook aŭ blogejo.